


Sennaciulo estas la oficiala organo de  
Sennacieca Asocio Tutmonda  
<http://www.satesperanto.org/>  
majo - junio 2011, n-ro 5 -6 ( 1271 - 1272 ) Prezo €7

# Sennaciulo

**Nia dosiero**  
**Socialismo hieraŭ, hodiaŭ , morgaŭ**



**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA  
SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!**

## Por infanoj, kontraŭ atomcentralo

La tago 5a de majo estas japana nacia tago por infanoj. Ĉi-jare en Sapporo (ĉefurbo de Hokkajdo en norda Japanio) okazis manifestacio kontraŭ atomcentralo, por infanoj en Fukusima (kie atomcentralo akcidentiĝas). Ĉ. 1,000 gecivitanoj partoprenis. En Japanio post la ŝokiĝo pro la akcidento, pli kaj pli multiĝas partoprenantoj de manifestacioj kontraŭ atomcentralo. En ĝi troviĝas 5 esperantistoj de Sapporo, Kioto, Osako kaj Jokohamo kun verda flago. Hazarde finiĝis tutlanda Esperanto-seminario en Sapporo ĵus antaŭ la manifestacio. Do ni preparis flugfoliojn kun kelkaj esperantaj vortoj kaj disdonis al la partoprenantoj de la seminario.

En Fukusima multaj lernejoj estas poluciitaj per radioaktivaĵoj. Japana registaro decidis ke lernejo poluciita malpli ol 20msv/jare estas senproblema por lernado. Sed laŭ leĝo, ĉi tiu limkvanto estas nur apenaŭ permesata al laboristoj en radioaktiva medio kompreneble kie junuloj malpli 18-jaraj ne rajtas labori. Konsilisto por Kabineta Sekretariejo, profesoro KOSAKO Tosiso (studas pri radiosekureco) rezignis pro nesincera konduto de japana registaro. Li diris en ĵurnala konferenco "Se mi akceptas tiun limkvanton por lernantoj, mia sciencista vivo finiĝos. Mi ne volas meti mian infanon en tiu situacio." Civitanoj en Japanio kritikis la registaron, traktadas kun la registaro, faras manifestaciojn kaj kolektas subskribojn por ŝanĝigi la politikon de la registaro.

MIYAZAWA Naoto (fotoj: HIRAI Isako)





## Socialismo, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ

### Antaŭparolo:

Socialismo kiel koncepto devenas de la latina vorto "socius", kiu signifas kunulo, kuna, t.e. kiu havas sencon por la komunumo. Socialismo estas teorio de socia transformado samkiel movado direkte al tiu transformado.

Socialismo estas socia ordo, kiu forigas privatan posedadon kaj instalas socian posedadon de produktrimedoj.

Socialismo enkondukas sistemon de rilatoj en kiu laboro kaj la rezulto de laboro iĝas mezurilo de la loko de la homo en la socio, laŭ la regulo "Al ĉiu laŭ sia laboro". En socialismo likvidiĝas la rilatoj de dungado, ekspluatado kaj dominado per la politika kaj ekonomia regado de la laborista klaso.

-Utopia socialismo ekestis en la dua mezo de la 18a jarcento kaj en la komenco de la 19a jarcento kaj reprezentas idearon de socialistaj kaj socialaj reformantoj, kiuj opiniis, ke ili povis forigi ĉion malbonan per la vojo de libervolaj unuiĝoj.

Reprezentantoj de tiu socialismo estas Ŝarl Furje (Charles Fourier), Sen Simon (Saint-Simon) kaj Robert Oŭen (Owen). Ili konsideris, ke socialismo estas nova organizo de produktado, kiu povas realiĝi sen klasbatalo sed per klerigado de la mensoj kaj humanisma predikado.

-Konata estas la ideo de la 'gilda' socialismo, ligita kun la personeco de la konata angla pensulo Ĝon Kol (John Cole) universitata profesoro en Oxford kaj ligita kun aliaj britaj intelektuloj el la komenco de la dudeka jarcento. La 'gilda' socialismo antaŭvidas la socian posedaĵon de la produktrimedoj en produktadaj organizaĵoj (gildoj) kun reprezentantoj en la kongreso de la gildoj, t.e. la tiel nomata demokrata socialismo, kiu devenas de la nacia kaj ekonomia planado kaj de la partaj naciigoj de la industrio konservante la ĝisnunaj parlamentaj formoj de la povo, kiuj karakterizas la kapitalismajn landojn.

-La fabiana socialismo ricevis sian nomon laŭ la societo de Fabian organizita en Anglio en 1884. La fabiana socialismo forĵetas la klasbatalon konsiderante, ke la socialismo venos de evoluo kaj kompromiso kun la aliaj partioj, kiuj estas reformemaj.

-La kristana socialismo de la 19a jarcento naskiĝis de la penso ke la nehomajn sekvojn

de la industria revolucio kaj de la disvolviĝo de la kapitalismo (malriĉeco, malegaleco, morala dekadenco) superu la kristanaj bibliaj principoj en la kadro de memmastrumataj laborejoj en la komenco kaj poste per kooperativaj movadoj. Ĝiaj reprezentantoj estis CH. Kingsley (Kingsli) kaj F. Morris.

En la teorio estas diversaj interpretadoj, de kio estas la elementoj de socialismo :

a) Unuj identigas la socialismon kun aro da socialismaj ŝtatoj.

Aliaj komprenas socialismon kiel mondan procezon kaj trovas elementojn de disvolviĝo de socialismo en diversaj politikaj kaj ekonomiaj fenomenoj kiel ekzemple, kie estas la plej alta nivelo de organizado kaj kie estas la plej aktiva rolo de la laborista klaso kaj de ĝiaj organizaĵoj, (kio estas tipa por evoluintaj kapitalismaj landoj.)

Tria interpretado indentigas socialismon kun naciigado de la produktrimedoj (kio karakterizas evoluantajn landojn) kun egala disdonado de la naciaj riĉaĵoj kiel rezulto de la batalo de la laborista klaso kaj diversaj postuloj de la laboristoj, por ke ili administru la produktadon kiel socian sistemon de produktada administrado.

En tiu ĉi prelego ni indikis nur kelkajn bazajn informojn pri la diversaj komprenadoj de socialismo ĝis ni pritraktos en la teksto de la artikolo mem la sciencan socialismon.

Pri la hieraŭa socialismo, kiu estis parto de la realeco en la socialismaj landoj post la Oktobra Revolucio kaj kiu praktikiĝis en USSR, oni parolas pli pri la aspekto kaj la nombro de landoj, kiuj estis socialismaj.

Hodiaŭ ni konsideros socialismon el la sama kriterio, la nombro de socialismaj ŝtatoj, kiuj havas socialisman socian ordon, dum ni parolos pri la morgaŭa socialismo tra la novaj eblecoj, kiuj povas esti rezulto de la laboro kaj de la klopodoj de la unuiĝinta monda proletaro.

**Mira Makivić, membro de SAT**

